
N-ro 180 septembro 2004 (3)




# La Migranto

Naturamika Internacio Esperanto Fako

TANEF

# La Migranto

*Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj.*
*Eldonita kun aprobo kaj interkonsento de la Naturamika Internacio .*

Eldonanto TANEF
Apermonatoj
marto, junio, septembro, decembro.

Redaktofino
ĉiam la 1an de la antaŭa monato.

Naturamika Internacio-NAI
Ĝen. Sekretario: Michael Procházka
Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien,Aŭstria

Internacia fakreferanto :
Vakas.

Ĉefredaktorino: Antje Noordewier-Jagtenberg
Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden,Nederlando
Retadreso: bart.noordewier@12move.nl

Redaktorino: Erna Döring
Klingelbergstr.11, CH-4056,Basel Svislando.

Redaktoro / Korektanto: Bert de Wit
Houtvaartkade 21, NL-2111 BR, Aerdenhout,
Nederlando.
Retadreso: ajf.dewit@wanadoo.nl

La aŭtoroj mem respondecas.

Kasisto/abonanto-administracio :
Eric Baert, Rue des Taillis 23
BE-1420 Braine L'Alleud BELGIO.
ĝirkonto: n-ro 7543982 nome de "La Migranto"
Rue des Taillis 23, Braine L' Alleud BELGIO.
Rete : eric.baert@swing.be
Pagoj el eŭrolandoj sub mencio de Iban-nro :
Konto La Migranto NL 77 PSTB 0007543982
BIC:PSTBNL.21

UEA-konto tanf-a
Vi ne uzu la vorton "kotizo" aŭ"abono" sur via pagilo por eviti imposton. Se eble pagu al via landa peranto. La adreson vi trovas ĉiujare sur la koloraj paĝoj en la 4-a n-ro de La Migranto. Jarabono € 10

Presisto:
Grammé, Amersfoort, Nederlando.

Ĉi tiu gazeto estas presita sur medioafabla papero sen kloro.

**Recivitaj gazetoj, revuoj, k.a.**

Esperanto la verda stelo '94 nr-o 26.
Esperanto UEA 1171, 1172.
UEA-jarlibro 2004-Red.Roy McCoy
Horizontaal 4
Internacia Fervojisto 2004, 2 kaj 3
Internaciisto 4, jarkolekto 12
Kajero el la Sudo 62a, 63a
La Kancerkliniko 111
Katolika Esperantisto 185
Norvega Esperantisto 3
La Sago (SAT-Amikaro) 5 kaj 6
Sennaciulo 1187, 1188, 1189
Sennacieca Revuo 2004 , n-ro 132
SLEA-Informilo 2004, 3 kaj 4
La Verda Proleto 424

**Enhavo :**

Urĝe serĉate/ teksto frontpaĝo 3
La naturo prononcas sian verdikton ;
Kaest 2004 4
Ekoturismo ; ricevitaj donacoj 5
Opinioj de Litovoj pri la eniro en EU 6,7
Esperanto-parolantino en la EP 8
Juna antuso manĝigas instinkte junan
kukulon ; 46-a skisemajno Hisp.Ferv. 9
NFI- La eŭropaj vojoj en la estonteco 10
La birdoj en mia regiono (2) 11
NFI-Kanalfosado endanĝeras la
Danubo-Delton 12
Naturamikoj en Senegalio ; Faulhaber
Semajnfino en Nederlando 13
La bulgaroj kaj ilia rilato al la naturo ;
12-a Intern. Esp-semajno Kulturo kaj
Turismo 14
Feriu en la Naturamika Domo
ABK ; Boulogne 2005 15,16

## Urĝe serĉate ; alarmkrio.

De kiam s-ro Willkommen ĉesigis sian laboron kiel internacia fakreferanto, ni ne havas posteulon. Por la ekzistado kaj disvastiĝo de Esperanto en la internaciaj kontaktoj inter la membroj estas la uzo de « dua lingvo por ĉiuj » pli neseca ol iam antaŭe. Ne nur en la Eŭropa Unio pligrandiĝis la nombro da aliĝintaj landoj, ankaŭ la NFI (Naturamika Internacio) rapide kreskis per novaj unuiĝoj kaj partnero-grupoj. Pli da landoj signifas pli da lingvoj kaj pli da lingvo-konfuzo. Por ni, Esperantistoj, estas tute klare ke Esperanto certe estu la solvo sed ni ankaŭ bone scias ke mankas esperantaj parolantoj.
Septembro estas aŭ estis ? iam "la verda monato", la tempo por serĉi novajn kursanojn por la aranĝo de kurso. Sed ĉu tio okazos ankoraŭ ie ?
Jam en la dudekaj jaroj de la antaŭa jarcento opiniis grupo da esperantistaj naturamikoj ke Esperanto estas neseca por la kreskanta internacia laboro. Kun multe da peno ili sukcesis fondi esperantan fakgrupon en la NFI-estraro. La internacia Esperanto-fakreferanto estas la ĉenero kaj la defendanto de Esperanto en la NFI-estraro.
Estu klare ke tiu grava figuro estas nemankipova por ni. Tiu manko klarigas la supran alarmkrion. Grava postulo por la posteno de internacia fakreferanto estas ke li (ŝi) estas membro de sia landa naturamika asocio. Nome la landa organizo devas proponi la kandidaton al la NAI-Kongreso, la kandidato devas havi la apogon de tiu landa asocio. La kongreso okazos en oktobro venontjare, jam en 2004 oni devas prepari la kandidatigon.
Se vi povus helpi nin sed dezirus pli da informo, petu ĝin al Bert de Wit (adreso kaj retadreso vi trovas sur paĝo 2), kiu jam estis nia internacia fakreferanto sed pro multe da alia laboro devis ĉesi. Ankaŭ via aliĝo estos bonveno ĉe li !

Speciale por nia nederlandaj legantoj : Aad Demmendaal ĝis nun ne trovis iun, kiu transprenos de ŝi la taskon pri la enkasigo de abonmono en Nederlando.
Kiu anstataŭos ŝin? Adreso : Boekenrode 11, 3085 JA Rotterdam.
A.M.Demmendaal@planet.nl

## Teksto ĉe la frontpaĝo:

La historia nederlanda kamparana veturilo komunikas:
Per ĉi tiu veturilo
Portas mi la rikolton.
Tio estas mia pano.
Krome ankaŭ per ĝi ĝojveturas
Kaj ĉe la fino ĝi transportos mian ĉerkon.
Foto : Bart Noordewier

## La naturo prononcas sian verdikton.

Iam en vilaĝo loĝis du fratoj. Vasilo la pli aĝa, estis laborema kamparano kaj naturamiko. La pli juna, Hristo estis instruisto en vilaĝa lernejo. Li edziniĝis urban fraŭlinon, transloĝis al la urbo kaj lia edzino altrudis kaj sukcesis eduki lin laŭ urba elita vivmaniero. La vilaĝanoj memoras ŝin pro ŝia aromega parfumo, kiun ŝi postlasis. Ili havis nur unu filinon, dorlotiton kiel ŝia patrino. Oni aŭdis ke ŝi kiel malĉastulino forvagadis diversurben, eĉ fremlanden.

Kutime, post matenkrepusko, Vasilo prenis sian falĉilon aŭ alian ilon, saketon kun iomete da nutraĵo, kalabaso da akvo kaj direktis la paŝojn al la kamparo.

Pli malfrue, post sunleviĝo, Hristo, la instruisto, ellitiĝis, vizitis drinkejon, ricevis mentbrandon, mendis ĉe la buĉisto buĉotan ŝafidon, kompreneble laŭ la edzina komisio. Trinkaĵojn por la matenmanĝo, vinon kaj bieron, oni malvarmigis en la korta akvoputo. Por la pli aĝa frato Vasilo, la maten- kaj tagmanĝo estis pano, fromaĝo, legomoj, fruktoj kaj freŝa akvo el la kalabaso. Akvumite kun ŝvita ĉemizo li sekiĝis sub la suno kaj laboris ĝis duonlumo. Kiam la vetero ne konvenis por kamparana laboro, Vasilo travagis tutan ĉirkaŭaĵon por amasigi drogherbojn, fungojn kaj ne-kulturitajn fruktojn. Inter la vilaĝanoj oni juĝis diverse pri la vivoj de ambaŭ la fratoj. Iuj envias, aliaj kompatas laŭ diversvidpunktoj.

Hristo, la manĝotablema instruisto mortis juna. Vasilo, sen drinkaĵoj, sen rostita viando, proksimiĝis centjaraĝa, ankoraŭ vigla. Lian laboremon, vivmanieron, amon por la naturo li transdonis al siaj gefiloj kaj genepoj.

Laŭ neskribitaj leĝoj la naturo malavare donacas homojn, kiuj obeas ĝiajn postulojn. Ne forgesu ke la antikva greka poeto Menandar, 3/2 jarcentojn a.K., diris : »por la naturaj leĝoj la homo nenien povas sin kaŝi «

La naturo ĉiam prononcas sian ne-apelacieblan verdikton al la homaro.

Ivan Tr. Minčev, Bulgario.

## KAEST 2004

La Ĉeĥa Esperanto-Asocio kore invitas vin al :

**Konferenco**. Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, okazonta en Dobrichovice (CZ) je 2004-11-12/14.

**Pritraktotaj temoj** :
Sekcio A : Fake pri Esperanto.
Sekcio B : Esperante pri Sciencoj

La organizan flankon garantias KAVA-PECH, profesia kongresa agentejo de P. Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobrichovice.
Tel.: +420 257712201.
Rete: info@kava-pech.cz
http:/www.kava-pech.cz/kaest

## Ekoturismo.

La tuta homa vivo estas intime ligita kun la naturo. Ĝi donas al ĉiuj vivantaj estuloj la necesajn vivkondiĉojn – aero, akvo, flaŭro, grundo k.a.
Multe da homoj fiere deklaras ke ili utile kaj agrable fartu, trapasante la libertempon en la naturo. Lastatempe ekoturismo iĝis nova industrio kaj nekredeble forte disvolviĝis. Paralele kun tio oni povas antaŭvidi ke supermezurebla torento da turistoj povus kaŭzi nerestarigeblajn ekologiajn malutilaĵojn kaj povus detrui naturan ekvilibron.
La turistoj malpurigas la naturon , aliformigas la terenojn kaj naturĉirkauaĵojn kaj damaĝas precipe tiujn defenditajn teritoriojn, plej allogajn por turistaj grupoj. Tiumaniere la teritorioj "kadukiĝas" kaj perdos la altiran forton. Pruvite estas ke bestoj ne povis altrudi sian volon al la naturo pere de agoj, tio nur sukcese povas homoj. La problemoj rilate la konservadon kaj gardadon de la naturo estas zorgoj de tiu sama homo kiu rompas ĝian belan ravon. La ekoturismo praktike povas garantii la vivrimedojn de multaj homoj, prefere de montaranoj kaj iliaj familioj.
La plifortigita stimulo de tia speco de turismo nepre estu konsiderita kun vico de reguloj por ke oni ne sakrilegu la naturan virgulinecon. En nia lando (Bulgario) pro gardado kaj restarigado abundas tiaj ekzemploj
Ankoraŭ ekde la jaro 1903 turista societo en la urbo Veliko Tarnove organizis balon. La enspezoj estis uzitaj por forstumi la pinarbarojn, konstrui vojetojn, turistajn ŝirmejojn k.a. Tiurilate estas iomete da tradicioj inter la turistoj kaj la aliaj naturamantoj, kiuj devas aktivi ĉieloke kaj regione.
La naturo alvokas kaj atendas nin kiel turistojn, kiel siajn kuratorojn kaj defendantojn!
Ivan Tr. Minĉev, Bulgario.

**Kun ĝojo mi povas informi vin pri jenaj recivitaj donacoj :**

| | |
|---|---|
| Belgio : René De Clerck | € 5.00 |
| Francio : Robert Durand | 2.00 |
| Germanio : | |
| Prof. Ferdinand Brückmann | 2.80 |
| Anneliese Brünow | 2.80 |
| Nora Caragea | 2.00 |
| Lothar Eckert | 5.00 |
| Amelia Garcia | 1.80 |
| Werner Heimlich | 0.25 |
| Karin Lencki | 0.25 |
| Rainer Merath | 0.25 |
| Annemarie Orterer | 5.35 |
| Johannes Radam | 15.00 |
| Manfred Retzlaff | 0.25 |
| Anneliese Rudolf | 2.00 |
| Hermann Schmid | 0.25 |
| Rolf Terjung | 10.00 |
| Maria Vitalyos | 13.50 |
| Nederlando: | |
| K.I. de Bruin | 5.- |
| M.A.Stöve | 20.- |
| W.T.J.Zeiss | 10.- |

Ni kore dankas niajn donacintojn.

## Opinioj de Litovoj pri la eniro en Eŭropan Union.

Litovio estas ne nur unu el la nov-aliĝintaj landoj de la Eŭropa Komunumo sed ankaŭ unu el la 23 aliĝlandoj de la Naturamika Internacio en Vieno.
Jena artikolo, verkita de s-ino Gražina Opulskiene (Litovio) estis legata kadre de publika debato, okazinte en la franca La Roche-sur-Yon dum la 59a kongreso de SAT-Amikaro dum la Paskotagoj de 2004.
Gražina estas perantino de SAT en Litovio, en kies ĉefurbo Vilnio en 2005 okazos la 90a Universala Kongreso de Esperanto.

"En la mondo estas multaj malgrandaj ŝtatoj, sed vere konataj estas nur tiuj en kiuj oni militas, ferias au kie okazas io tre speciala. Litovio ne apartenas al unu el tiuj kategorioj kaj nun, kiam enirante la Eŭropan Union, ni havas la ŝancon prezenti nin kaj ekparoli pri ni, plej unue ni demandas nin : kion ni povas doni al EU kaj kion ni atendas de ĝi ?
Kion ni atendas estas sufiĉe facile difini : ni volas tion, kion ni ne havas – bonajn salarojn, saĝajn leĝojn, altan vivnivelon kaj garantiitan sekurecon... Sed ĉu la EU tion garantias kaj ĉu Litovioj estas sufiĉe optimismaj por tion kredi ? Ne estante naiva popolo ni scias, ke la reĝo de donacoj jam delonge mortis kaj ĉion, kion ni ricevos, ni ankaŭ devos pagi.

Jen kelkaj plusoj kaj minusoj kiujn Litovoj atendas de la eniro en la EU :
1e En politika senco Litovio devus iĝi pli stabila ŝtato, kiu denove aperas sur la mapo de Eŭropo. Partoprenante en la kreado de kumuna Europo, ni partoprenu en "la granda politiko" kaj ne restas kiel fora kaj nekonata provinco. Maltrankviligas Litovojn penso, ke partopreno en tiu granda politiko reale povas ne funkcii kaj ke pli grandaj kaj potencaj ŝtatoj de EU diktos siajn decidojn.
2e Eniro al la EU kaj NATO estas garantio de paco. Ja Litovoj daŭre sentas pri la ekzisto de Rusio apude kaj tiu nia granda najbaro ne estas la modelo de demokratio kaj stabileco. Samtempe la litovoj, babilante ĉe glaso da biero unuanime konsentas ke se Rusio denove decidus okupi Litovion, EU farus apenaŭ pli ol sendo de skribitaj protestoj al Moskvo.
3e Aparteno al EU donos al Litovio eblecon eniri la plej grandan merkaton de la mondo, havi pli da utilaj komercaj ligoj, atendi ekonomian kreskon, krei novajn laborlokojn. Samtempe Litovoj timas, ke konkurenci kun produktoj de aliaj landoj en EU estos ege malfacila, ke pro tio bankrotos multaj malgrandaj entreprenoj. Tiam nur la grandegaj unuiĝoj adaptiĝos al la ŝanĝoj kaj transvivos. Plue kreskos la abismo, kiu aperis en Litovio post la sendependiĝo inter riĉuloj kaj malriĉuloj.

4e *« Membreco en EU promesas al litovoj vivi, studi, labori, vojaĝi libere. Tio malfermus pli da eblecoj al la studenta junularo kaj al homoj kiuj ne trovas labor-lokojn en Litovio ».*
Tiel sonis unu el la plej allogaj sloganoj dum la varbkompanio por EU. Nun ni scias ke ĉiuj ŝtatoj de EU krom Irlando, deklaris ke labori la litovoj povos nur post du, en kelkaj landoj eĉ post sep jaroj. Konsiderante ke nun en eksterlando nigre laboras pli ol 100 000 litovoj, tio ĝojigas ne tiujn kiuj sopiras formigri. Laŭ la statistikoj eĉ 2/3 da litovoj volus formigri eksterlanden kaj kiel ĉefan kialon ili indikas »havi laboron ».
5e Eniro al EU por Litovio estus ebleco altiri monon de diversaj fondusoj por disvolvigi la plej malriĉajn kaj ekonomie malfortajn regionojn de la lando, tamen la jaroj post la sendependiĝo pruvis al ni ke litovaj politikistoj kaj ŝtat-oficistoj tre ofte inter la interesoj de Litovio kaj propraj interesoj, elektas la proprajn. Malfacilas ek-kredi por ordinara litovo ke mono kiu venos de EU, ne dronos en la poŝoj de kelkdekoj da potenculoj.
6e Plej forta »eŭroskeptikismo » fontas de niaj kamparanoj ĉar jam nun en EU estas produktataj tro da produktoj. Konsolas ilin politikistoj kiuj promesas ke por la merkato de EU estus bonvenaj ekologie kreskigitaj nutraĵoj kaj ke la loĝantoj de EU ŝatos ferii en niaj vilagoj. Unu el la tiklaj demandoj estas : » kian rolon rolos la litova lingvo en EU ? », Oficiale trankviligo sonas ke la litova lingvo iĝos unu el la laborlingvoj de EU kaj ke EU klopodas krei la kulturon de komuna Eŭropo flegante kaj protektante la identecon de ĉiu eniranta lando. Multaj litovoj rimarkas ke altrudo de la angla lingvo jam nun estas sentebla kaj timas ke baldaŭ tio fariĝos same »propravola/-deviga » kiel en ne tiom malproksima pasinteco estis la rusa.
7e Multaj aliaj opinias ke la historio de Litovio jam pruvis ke des pli aliaj lingvoj estis al la litovoj altrudataj des pli fidelaj ili restis al la propra. Ideojn ke EU bezonas iun neŭtralan lingvon ĝis nun eblas aŭdi nur inter la litovaj esperantistoj.

Tiaj estas niaj ĉefaj pensoj pri la estonto, sed fakte litovioj konscias ke ne estis alia alternativo ol aliĝo al EU kaj dum la referendumo eĉ 91,07 % diris " jes" al la aliĝo. Membreco koincidas kun la interesoj de Litovio, donas la eblecon al la lando progresi kaj kune kun la aliaj ŝtatoj krei la komunan estonton de nia Eŭropo.
Gražina Opulskiene en La Sago, SAT-Amikara gazeto n-ro 5, 2004

**Peto de Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto.**
Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al :
Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto.
Sinzyuku-ku waseda-mati 12-3
TOKIO, 162-0042, Japanio.

## Esperanto-parolantino en la Eŭropa Parlamento.

Kiam la Eŭropa Parlamento formale remalfermiĝis la 20-an de julio 2004 ĝi havis inter siaj membroj, verŝajne unuafoje, fluan Esperanto-parolanton.
S-ino Margareta Handzlik estas reprezantino de la Silezia Regiono en Pollando kaj estis proponita kiel kandidatino de la Civitana Platformo.


Margareta Handzlk parolas Espeanton jam de dudek jaroj kaj lernis la lingvon dum siaj vojaĝoj kun sia edzo, Georgo Handzlik. Li estas populara Esperanto-kantisto, verkisto, eldonisto kaj instruisto. Nun Esperanto estas parto de ŝia vivo. "Kelkaj esperantistoj skribis al mi ke mi estas la unua esperantista membro de la Eŭropa Parlamento. Mi ne kontrolis tion", ŝi skribis, sed en postaj deklaroj al la Poreksterlanda Programo de la Pola Radio en Esperanto, ŝi agnoskis : "mi verŝajne estas la unua esperantistino en la EP". Dum la ĵusa balotada kampanjo en Britio ni trovis, ke almenaŭ tri kandidatoj lernis Esperanton, do statistike oni povus eble atendi ke kelkaj antaŭaj eŭroparlamentanoj iom konis pri la lingvo.

La balotadkampanja retejo de Margareta Handzlik estis en la pola lingvo kaj en Esperanto. Dum la lastaj 15 jaroj ŝi kaj la edzo estris kelkajn kompaniojn : la eldonejon KLEKS, kiu eldonas librojn en la pola kaj Esperanto, edukcentron por instruistoj, kursejon pri fremdaj lingvoj, studion por ĵurnalistoj kaj eldonistoj. Tamen la plej konataj estas du lokaj radioj, Radio Bielsko en Beskidoj kaj Radio Mega en Silezio.
"Mia tuta familio parolas la internacian lingvon", ŝi skribis en sia retejo. "mia edzo Georgo estas instruisto kaj esperanto-kantisto, niaj filinoj Monika kaj Dominika ankaŭ parolas la lingvon kaj havas multajn geamikojn en pluraj landoj. Nia familio vizitis multajn E-aranĝojn i.a, la UEA-Kongresojn en Montpeliero kaj Berlino, la PSI kaj ni gastiĝis en Bona Espero (Brazilio) ĉe la gesinjoroj Grattapalia.

Margareta jam renkontiĝis kun la Hungara Esperanto-Asocio, kiu donis al ŝi dosieron de dokumentoj pri Esperanto kaj la eŭropa lingva situacio, antaŭe preparitaj por disdonado inter hungaraj politikistoj. Restas ankoraŭ vidi ĉu ĉi tiu havos ian efikon sur tion, kion la ĵus elektita prezidanto de la EP, Josep Borell nomis la "nun pli komplika lingva scenejo de la EP", dum la malferma sesio. Ŝia devizo estas :
"problemoj ekzistas nur por esti solvitaj !"
Laŭ interretaj fontoj Ĝangalo-red.


## Juna antuso manĝigas instinkte junan kukulon.

En julio 2004 la edukcentro por birdoj kaj sovaĝaj bestoj en Oostende (Belgio) ricevis inter ĉiaj aliaj nestidoj junan kukolon (cuculus canorus) kaj junan antuson (anthus pratensis). Ne ĉiutaga okazo, ĉar la antuso ne petis por manĝo kaj eduki kukulon certe ne estas sinekuro.
Pro praktika kaŭzo ambaŭ la birdetoj kune lokiĝis en unu birdejon ĉar ili bezonas relative multekostan menuon konsistante el vivanta nutraĵo kiel griletoj kaj farunvermoj. Tiurilate neniu sensacio, sed ........



Je ilia granda embaraso la prirespondeculoj de la birdocentro konstatis ke la antuseto ekprovizis la kukulon per nutraĵo ! La juna kukulo eligis plendantan almozvokon post kio la antuseto prenis farunvermon aŭ memkaptitan muŝon en la beketon, alportis tion al la kukulo kaj enmetis ĝin en la malfermegan bekon. Por esti tute klare : la kukulo ne forprenis la manĝaĵon de la antuseto ; ĝi sendube estas manĝigita ! Tiu almozvoko de la kukulo certe jam elvokos ĉe la venontaj nutrogepatroj tre junaĝe la nutradkonduton.

Post kelke da tempo, kiam la kukulo estis kvinfoje pli granda ol la antuseto, la lasta eksidis sur la dorson de la kukulo por nutri ĝin.



*El la nederlanda radioprogramo " Vroege Vogels".(Fruaj Birdoj)*

## 46-a Internacia Esperanto Ski-semajno en Katalunaj Pireneoj La Molina.

La vintra 46-a skisemajno , nun organizata de la Hispana Esperanta Fervojista Asocio, okazos de la 23-a ĝis la 28-a de januaro 2005 en La Molina (Municipo de Alp) en la Katalunaj Pireneoj. La Molina havas du skieblajn montopintojn.
La aliĝkotizo : € 10 ĝis 01/10/04, poste € 15. Loĝado en la hotelo Super Molina. Prezoj : 6 noktoj en dulita ĉambro p.p. € 193,50, unulita € 251.55 duonpensiono ; kompleta pensiono € 209,30 kaj € 272,10
Adreso : Hispana Esperanta Fervojista Asocio, Apart 15027, 08080 Barcelona, Katalunio Hispanio.

**Gazetara teksto – Naturamika Internacio.**
**Junio 2004.**

## La eŭropaj vojoj en la estonteco.

Per ĉi tiu slogano ekiris la NFI-prezidantoj-Konferenco, difinante novajn laborcelojn por mez- kaj orienta Eŭropo.
Krom tio Rumanio estis feste akceptita kiel la 23-a landa organizo de NFI.

La NFI-direkcia Konsilio kaj la prezidantoj el la 22 naturamikaj asocioj okazigis sian konferencon de la 10a–13a-06-2004 en Seelow, Germanio en la regiono " Lebuser Land". Oni elektis ĉi tiun regionon ĉar ĝi estas por NFI "La Pejzaĝo de la Jaro 2003/04" kaj por ke oni pli detale konigu tiel la regionon pro ekskursoj kaj interparoloj kun politikistoj kaj NGO-reprezentantoj. Centre de la interkonsiliĝoj estis gravaj demandoj pri la eŭropa unueco kaj la NFI-laboro en la novaj aliĝlandoj.

**Nia naturheredaĵo en mez-kaj orienta Eŭropo.**
En unuanima rezolucio pri "La eŭropaj vojoj en la estonteco" estas precipe akcentitaj la natur- kaj pejzaĝriĉecoj de la novaj eŭropaj landoj. La naturamikoj deziros subteni kaj disvolvi tie natur- kaj kulturturismojn, ligante la gravecon de la protektata naturo kun la interesoj de la enloĝantaro. Centre de tiuj naturamikaj aktivecoj en la kadro de "naturo 2000" por la protektado kaj konservado de nia naturheredaĵo, speciale por la savado de la nekutima natur- kaj pejzaĝkapitalo en la novaj eŭropaj landoj. Dezirinde por la Naturamikoj estas ke ĝenerale la tuta Eŭropa ekonomia politiko konsekvence estu konformigita al la principo de daŭrigebla disvolvo. Do integrite en la hodiaŭaj paktoj de la mediaj interesoj sur ĉiaj terenoj.

**Proksima prirespondeco.**
La Naturamikoj volas Eŭropon kiu egalvalore realigos la celojn de ekonomia disvolvo, socia justeco kaj laŭ paktoj decidite ekologio kaj aktivan, gravan rolon akceptos en la proksima prirespondeco. Per tiu Eŭropo ankaŭ povos fariĝi la antaŭulo en la efektiviĝo de la UN-strategio por longdaŭre efika disvolvo. Rezolucio kaj teksto : www.nfi.at
NFI-sekretariejo, Michael Procházka – Vieno.
Esp. trad. A.N.

## La birdoj en mia regiono.



**La garolo : ( garrulus glandarius)**

Ĝi estas diverskolora membro el la ordo de paseroformaj birdoj, familio de korvedoj, kiel la pigo kaj la korniko el L.M. 179. Ĝi kutime loĝas en arbaro sed ankaŭ en ĝardenoj kaj parkoj. Ĝia manĝo konsistas grandparte el insektoj, se necese ankaŭ el semoj kaj vintre el glanoj. Dum la aŭtuno ĝi kolektas glanojn kaj kaŝas ilin ĉie; ĉar la birdo ofte forgesas kie, estas tio profite al la disvastiĝo de la kverko.

La neston ĝi metas sur arbon aŭ arbuston, ĝi uzas branĉetojn por tio kaj tegas la neston per radiketoj kaj haroj. En la neston la garolo demetas 3 aŭ 4 ovojn.

La garolino kovas 16 tagojn. Jam post 20 tagoj, la idoj elflugas.

Vidu PIV p.84, la lasta eldono.


**La turdo : ( turdus viscivorus)**



La turdo estas iom pli granda ol la kantturdo kaj havas blankan bruston kaj iomete blankajn vostajn plumojn kaj fortikan bekon, iom kurban. Ili vivas en ĝardenoj, parkoj kaj dunoj.

La neston ĝi kunmetas alte en branĉforko. La nestkuvo ne estas tegita kiel tiu de la kantturdo. La turdo produktas 3 aŭ 4 ovojn. La ovoj estas bluaj kaj havas ruĝe-brunajn makuletojn kaj punktetojn.

**La merlo : (turdos merula)**



La merlo estas specio de turdo, nigra aŭ brunigita kun flava beko, bele kantanta. Origine ĝi estas arbara birdo, kiu nur nestis sur la densaj branĉoj de arboj kaj arbustoj sed ŝanĝiĝis iom post iom je urba birdo.....Nuntempe ĝi preskaŭ ĉie nestas., en heĝoj, sub tegmentaj tegoloj, eĉ sur la tero.

La merlo kunmetas bonan kaj fortikan neston. Gi uzas por tio radiketojn, sekajn herbojn kaj eĉ paperaĵojn kaj plastaĵojn. La tegaĵo de la nesto konsistas el malseka tero kune kun malgrandaj ligneroj, fekaĵo kaj muko.

Merloj kovas du aŭ tri fojojn jare. La unua fojo jam povas esti dum marto. Ili demetas 4 ĝis 6 klare verdajn ovojn kun rugaj punktetoj kaj makuletoj.

Vidu PIV p. 731, la lasta eldono.

**La Kantturdo : (turdos ericetorum philomelos)**



Specio de turdo kun nigrecaj, ovalaj makuloj sur brusto kaj flankoj. Ĝi vivas en arelo kun malalta arbustaro. La kantturdo laŭte kaj klare kantas, sidanta sur alta loko. Ĝi manĝas vermojn, fruktojn, raŭpojn kaj berojn, ankaŭ helikojn kies konkojn ĝi frakasas sur ŝtonojn.

La nesto situas en heĝo aŭ arbusto. La konstrumaterialo konsistas el mortinta herbo, radiketoj kaj musko. La internan flankon de la nesto ĝi glatigas per fekaĵo kaj muko.

Vidu PIV p.1192, la lasta eldono.

Kolektis kaj tradukis Aat de Jong, Nederlando (*daŭrigota)*

**Gazetara teksto – NFI, 02.septembro 2004.**

## Kanalfosado endanĝeras naturprotektan regionon. Danuba Delto restu kiel monda naturheredaĵo. EU kaj UN subtenu.

Kune kun la novfondita rumana Naturamika Ligo protestas la Naturamika Internacio kontraŭ la aktivecoj de Ukrajno por la fosado de navigado kanalo en la Delto de Danubo.



Laŭ la opinio de la Naturamikoj kondukos la planitaj kaj jam parte komencitaj aranĝoj al la grand-parta ruinigo de ĉi tiu multvalora naturrezervejo. Per tiu kanalo pliboniĝu por Ukrajno la navi-gadointerligo de la Danubo kaj la Nigra Maro sed ĝi kondukas meze tra la ukrajna biosfera rezervejo Danubo Delto. En la regiono loĝ-as pli ol 320 birdspecioj, inter kiuj raraj akvo-bidoj kaj ĝi estas la hej-mo de peli-kanoj.



La Danubo-Delto situas en la limregiono inter Rumanio kaj Ukrajno kaj estis en 1990 proklamita de la UNESKO monda naturheredaĵo. Per la kanalfosado forpuŝas Ukrajno multnombrajn internaciajn inter-konsentojn. " La protektvaloraj deltoregionoj apartenas al la kapitalo, kiun kunportis la landoj en mez- kaj orienta Eŭropo," diris la NFI- prezidanto Herbert Brück-ner, "estu nia devo delikate trakti kaj konservi ĝin por la venontaj generacioj".

La Naturamikoj postulis per leter-oj al la EU-mediokomisarino Mar-got Wallström kaj la ekzekutiva direktoro de la UNEP paŝojn al la tuja haltigo de la ukrajnaj aktiv-ecoj kaj konsultiĝan konferencon pri alternativaj eblecoj.

La internaciaj Naturamikoj dezir-as konduki proprajn projektojn kaj aktivecojn por la protektado de la medio kaj al disvolviĝo de kvieta kaj milda turismo en ĉi tiu delta regiono. La rumanaj naturamikoj agas por proklami la Danubo-Delton « la eŭropa pejzaĝo de la jaroj 2007-2008 ».

Esp. trad. A.N.

**Naturamikoj en Senegalio.**
Internacia vojaĝo de NFI, novembro/decembro 2004.

Post la malfermo de la Naturamika Domo en Petit Mbao ĉe Dakar, la ĉefurbo de Senegalio (Afriko) en januaro 2004, la domo nun estas je dispono de naturamikaj grupoj kaj aliuloj kiuj estas interesataj de longdaŭraj efikaj vojaĝoj. La senegaliaj naturamikoj estas kompetentaj kaj engaĝigintaj partneroj por planado kaj akompanado de ekskursoj kaj vojaĝoj en sia lando.

La sekvonta internacia vojaĝo de NFI okazos de la 20-a de novembro ĝis la 5-a de decembro 2004. En la programo ne nur estas turistaj apogeoj de la lando, pli ĝuste la senegaliaj naturamikoj montros sian landon rilate el propraj vidpunktoj – kun multaj kontaktoj kun la popoloj, pri ilia kulturo, kutimoj, vivcirkonstancoj kaj problemoj.
La vojaĝo estas unuavice organizata por tiuj, kiuj donacis monon por ĉi tiu projekto por vidi propraokule la rezulton, sed restas ankoraŭ kelkajn lokojn por ceteraj interesitaj personoj.
La kostoj estas ĉ. 1400 Eŭroj, ek de kaj ĝis Parizo. Informoj kaj aliĝoj ĉe :
NFI, Ingeborg Pint- Diefenbachgasse 36, A – 1150 Vieno, Aŭstrio.
Rete : i.pint@nfi.at

---

**41- Faulhabersemajnfino , la 22-a - 24.a oktobro 2004, Nederlando.**

Kiel kutime dum la lastaj jaroj ĝi okazos en la feriejo ''Mennorode'', Apeldoornseweg 185, 8075 RJ Elspeet. Vi povos renkonti malnovajn kaj novajn amikojn, promeni tra la arbaro kaj ĝui distran kaj kulturan programon en Esperanto.
La temo estos : Kiom granda estas Eŭropo ? Kelkaj programeroj estos : Bert de Wit : Ĉu biologio konas limojn ; limtrapasoj en biologio en rilato al sociaj problemoj. Ko Hammer pri Faulhaber. Dafydd ap Fergus el Bruselo. Woody ten Hagen: gitaro kaj kantado , komuna kantado k.a.
Se ni havu lokon en la programo kaj trovos prezidanton, okazos Tanef-kunveno. Por aliĝilo aŭ informoj : Remment Balk, van Ijsendijkstr. 271, 1442 CM Purmerend. Rete: r.balk@wanadoo.nl

---

La zebro profunde amas la cervinon, tamen lia amo estas rifuzita La zebro kriegas : kial ? Pro kio estas ĉi ĉio ?
La cervido timeme respondis : mia patrino diris, ke ĉiu kiu havas tatuaĵon, estas sentaŭgulo.
El la ĉina esperantigis : Zhu Xin.

**La bulgaro kaj lia rilato al la naturo.**

Amo al la naturo, tio estas esenca trajto en la nacia bulgara karaktero . Jam en la antikveco nia popolo loĝis surtere inter belega naturo, altaj montaroj, densaj arbaroj, riveroj plenaj de pura akvo, mineralaj fontoj, lagoj, marbordo, fruktodonaj ebenaĵoj, multspeciaj sovaĝaj bestoj, birdoj kaj diverskreskaĵoj.

La vivoj de miaj samlandanoj estas nedisigeble ligitaj al la naturo. Eĉ nenio de bulgara agado estus ebla sen la naturo. Ĝis antaŭ 50 jaroj la vivrimedoj entute dependis de tio kion donis la naturo. Kiam nia lando estis sklavigita, estis la arbaroj la protektantoj de bravaj ribeluloj. Pri tio abundas la popolkantoj.

La festotagoj, kutimoj, kantoj, popolfabeloj, la infannomoj estas ĉerpitaj el aŭ ligitaj al la naturo. Ne ekzistas poeto, verkisto, pentristo, komponisto kiuj ne estas inspiritaj de la pompe kolorita naturo.

Sendube en multaj landoj la gepatroj ne povas montri al la gefiloj sovaĝan herbon, nesemitan per la homaj manoj. Samtempe la plejmulte el niaj infanoj plibonigos dum la ferioj en la naturo. Eble en industriŝtatoj multe da homoj jam forgesis aŭ ne scias kiamaniere lakto kaj ovoj aperas en la urbaj vendejoj, dum en preskaŭ ĉiu bulgara vilaĝhejmo estas lakto kaj ovoj de hejme breditaj bestoj kaj birdoj.

Tio forte impresas fremdlandanojn kiuj vizitas nian landon, Ni sentas nin devigataj konduti kiel veraj, zorgemaj gardantoj, por ke la naturo restu en la sama kvalito kia ĝi estis priskribita kaj postlasita de niaj praavoj.

Bulgario rajtas fieri kaj laŭdi sian naturon, naturamon kaj sian rilaton al la naturo !

Ivan Tr. Minĉev, Bulgario.

**12-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo,**

okazos en SALOU, (Hispanio) de la 2a ĝis la 9a de oktobro 2004.

La provizora programo : minimume 4 prelegoj kadre de la kul-. turo. Ankaŭ 4 ekskursoj. Distraj kaj interkonaj vesperoj, debatoj, muziko. Ensemblo ludanta iujn Esperantajn kanzonojn. Operovidbendoj, poetika angulo, teatra scenigo. Novaĵo estas la starigo de la premio " Ada Sirkorska", al kiu povas kandidati ĉiu Esperantist(in)o, aŭ proponata de E-klubo, grupo, asocio.

Pliajn informojn aŭ aliĝojn ĉe : Luis Serrano Pérez, Apartat 432 , ES-08200 Sabadell. Telefono : (+34) 937275021. Korespondo : luis.serrano@mixmail.com http://www.terra.es/personal5/lserrano2003 Prefere rete!

Veturante aŭtomobile, suriru la aŭtovojon A-7 ĝis la elirejo salida 35 kaj baldaŭ vi estu en Salou. Se vi venos aviadile, de la barcelona flughaveno estas trajno ĝis la stacidomo Sants, kajo n-ro 5.

# Feriu en la Naturamika Domo ABK.



*La Naturamika domo "ABK Huis"*


En la regiono en kiu situas la nederlanda naturamika domo "ABK-huis" apud la vilaĝo Hall (komunumo Brummen) estas multaj naturbelaĵoj kaj vidindaĵoj. La domo mem estas tre komforta kaj tute ekologie renovigita. La cirkaŭaĵo oni povas plej bone viziti per biciklo; bicikloj estas loke lueblaj.

Pluraj historiaj urb(et)oj estas proksimaj, ekz. Bronkhorst, (konata kiel Dickensurbeto laŭ la angla.verkisto Charles Dickens), Doesburg kaj Zutphen. La naturo estas tre bela : vidu la riveron



*La rivero Berkel en Zutphen*

"De IJssel", la arbarojn de la Naciaj Parkoj "De Veluwezoom", "De Loenermark" kaj "De Hoge Veluwe", kun aproj, cervoj kaj sovaĝaj bovoj. Nepre vizitinda tie estas la fama muzeo "Kröller Müller" ĉefe kun kolekto da pentraĵoj, skulptaĵoj kaj desegnaĵoj el la 19-a kaj 20-a jarcentoj, inter kiuj granda Van Gogh kolekto.



*Parko de muzeo Kröller Müller Driva skulptaĵo de Martha Pan*

Oni povas konstati ke la homoj multe perlaboris por vivi en tiu regiono. Akvofontoj spruĉas el la montetoj kaj en la pasinteco la homoj fosis apud la fontoj por havi pli da akvo. En la vilaĝo Laag Soeren oni uzis la puran akvon por kuraci malsanojn, famaj germanaj kuracistoj venis tien por starigi banejojn ; la monumento pri Dro Priessnitz memorigas pri tio. En Eerbeek oni uzis la forton de la riveretoj por funkciigi muelilojn por fabriki paperon ; nun modernaj fabrikoj

anstataŭas la muelilojn sed la muelŝtonoj ankoraŭ staras antaŭ ili por memorigi la pasintecon En Loenen situas la plej alta akvofalo el la ebena Nederlando :15 metroj. La homoj aranĝis ĝin en la 19-a jarcentro por nutri la kanalon "Apeldoorns Kanaal" inter Dieren kaj Hattem.
Tiun kanalon oni fosis ĉar la navigado tra la rivero IJssel estis malfacila.



*Apeldoorns Kanaal*

Nuntempe grandaj kluzoj permesas la navigadon tra la IJssel kaj la malnova kanalo fariĝis monumento, flankita de imponaj kverkoj.
Malnova vaportrajno veturas turistojn inter Dieren kaj Apeldoorn.
Apud la urbo Zutphen staras multaj domoj kies tegmentoj estas kovritaj per sunpaneloj por produkti elektron kaj aliaj por hejtigi la akvon. Ankaŭ la nobeluloj kaj la bonfartuloj ŝatis tiun regionon ; pri tio atestas la multaj domegoj kaj kasteloj.Ĉiujare oni aranĝas "fietsvierdaagse" t.e. 4 tagojn de biciklado por bicikloamantoj.

Do en ĉiu sezono la naturamikoj povas ferii agrable kaj interese en tiu Domo, sed nur per biciklo oni povas vere viziti tiun regionon.
Eric Baert, Belgio.

**Internacia Amikeca Esperanto-Renkontiĝo, centjariĝo de la Unua Universala Kongreso.**
Organizita de la Nordfrancia Esperanto-Federacio en Bulonjo ĉe-Maro (Nordfrancio), dum la Paskaj Festoj de 2005 de vendrede la 25-a ĝis merkrede la 30-a de marto. Temo : Esperanto perspektivoj post 100 jaroj de renkontiĝoj. Dume i.a. la 60-a Kongreso de SAT-Amikaro.
Informoj kaj aliĝiloj : SAT-Amikaro, 134 boulevard Vincent-Auriol 750 13 Paris, Francio Rete : sat-amikaro@wanadoo,fr

**21-a Internacia Festivalo,** la tradicia novjara aranĝo por familioj kaj mezaĝaj personoj, de la 27-a decembro 2004 ĝis la 4-a de januaro 2005 en la ĉefurbo de la federacia lando Saksio-Anhalto (Germanio)
Informoj kaj aliĝiloj :

Hans-Dieter Platz
Postfach 1148
DE-34303 Niedenstein,Germanio
Rete :
HDP@internacia-festivalo.de